Дмитрий Николаевич Садовников,

# Sten'ka Razin

*tradukita de Frieder Weigold*

1. De l' insulo, de la verda,
Dum la tempo de la car',
Naĝas vico da boatoj,
La arme' de l' kozakar'.

2. Sur l'unua Sten'ka Razin.
Oni gaja vidas lin.
Feliĉega tiu tago!
Li edziĝis kun princin'.

3. Ŝi mallevas la okulojn.
Kvazaŭ inter viv' kaj mort'
Ŝi aŭskultas en silento
Al sincera, firma vort'.

4. Liaj viroj tamen grumblas:
"Post nur unu nokto jam
Faris ŝi lin mem virino.
Li perfidas nin pro am'!"

5. Tion aŭdas kolerante
La kozaka kapitan'.
Kaj li kaptas la princinon,
Per la forta, ega man'.

6. Fulmas la okuloj duraj,
Flame ŝtormas la koler'!
Kaj eksonas lia voĉo
Krudglacie kiel fer':

7. "Ion ajn, eĉ mian kapon
Ja fordonus mi por vi!
La feliĉon mi ja trovis.
Ĉio estas ŝi por mi!

8. Volga, Volga, kara panjo,
Ho rivera rusa vi!
Kiam vidis vi oferon,
kian nun fordonas mi?

. . .

9. Ke neniam ni kverelu
Pro la persa belulin':
Volga, Volga, kara panjo -
La oferon - prenu ĝin!"

10. Kaj per ambaŭ fortaj manoj,
Dum ektimas la princin' -
Ve, deborde ŝin li puŝas! -
Kaj la ondoj voras ŝin!

11. "Diabloj! Kial vi silentas?
Dancu, kantu ja pro ŝi!
Kaj eksonu la kantado,
La fratara melodi'!"

12. De l' insulo, de la verda,
Dum la tempo de la car',
Naĝas vico da boatoj,
La arme' de l' kozakar'.

*Traduko de la Rusa poemo "Из-за острова на стрежень (Стенька Разин)" de* Дмитрий Николаевич Садовников *(Dmitrij Nikolajeviĉ Sadownikow, ∗1847 – †1883) en Esperanton de Frieder Weigold.*

*Arg-478-928 (2009-10-30 16:18:33)*

*Mi, Manfred Retzlaff, ricevis en 2008-10-09 tiun ĉi Esperantigon de la konata rusa kanto de s-ano Frieder Weigold (Birkenstr. 12, D-82178 Puchheim), dum kunveno de la Munkena Esperanto-grupo.*